

& El sama buŝo:

< Rekante 15 el 29 batoj por strofo, entute 145 paŝoj dum 2 minutoj. Verkis Kálmán Kalocsay (Ezopa Saĝo, 1956). Baladigis Martin Strid (2015) per melodio de Drako Longa kaj rekantaĵo de Davida balado.>

(#Melodio:

<:29> (o;mi /mimi mire redo doodo;do dodo dore miimi;mi mimi mire mire miimi;mi soso fami mimi;

(#Rekantaĵe: redo re rere mire do rere re; rere mire doTi LaSo So LaTi do)

)×5)+

(&Strofoj:

'1 La /faŭn', la homo, vojkompanoj, ; en vintro vage iris. ; Ekfrostis al la hom' la manoj, ; kaj li en ilin spiris.

(×: **Bruas danco en halo, dancu en ĉen'!** ; **Ĝojaj paŝas ni en esperanto-kunven'.**)

'2 "Sed kial tio, homamiko?" — ; la faŭno nun scivolis. ; "Nu, kial? Do por revarmigo" — ; la homo reparolis.

'3 Ili ripozis en kampdomo, ; ricevis eĉ manĝadon. ; La sup' tro varmis, kaj la homo ; ekblovis sur la pladon.

'4 "Ej! kial tio, homamiko?" — ; la faŭn' demande miris. ; "Nu, kial? Do por malvarmigo." ; Sed nun la faŭno diris:

'5 "Amikoj esti ni ne povas, ; mi perdis al vi fidon, ; kiu el sama buŝo blovas ; la varmon kaj la fridon.")